



**Svislando:
granda anonima letero**

**Ĉinio: prospero kaj
progreso post 60 jaroj**

**Agrokulturo:
ni fosu nian konton!**

s honestaj kaj ka-
plej fortaj gar-
Pro tio ili estas
ataj homoj sur nia
aroj ne povas to-

Germanio inter la
ĵurnalisto devis
, sed tute aparte
e Hitler.

a degeneriĝo Kurt
elokventan voĉon
fuzis fuĝi, ĉar li
vas agi kvazaŭ ĉio

Trevor Steele
Kvazaŭ ĉio
dependus de mi

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi

“Aŭtoro je vere monda nivelo”

Gerrit Berveling

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi



FEL



Ĵurnalistoj, se ili estas honestaj kaj kapablaj, estas inter la plej fortaj gardantoj de demokratio. Pro tio ili estas inter la plej endanĝerigataj homoj sur nia planedo: koruptaj registaroj ne povas toleri oponantojn.

En la tumulto epoko de Germanio inter la du mondmilitoj sentima ĵurnalisto devis oponi ĉiujn ŝovinistojn, sed tute aparte la leviĝantan movadon de Hitler.

En tiu tempo de morala degeneriĝo Kurt Lenz kuraĝis levi sian elokventan voĉon kontraŭ barbareco kaj rifuzis fuĝi, ĉar li kredis, ke ĉiu el ni devas agi *kvazaŭ ĉio dependus de mi*.

Serio Stafeto n-ro 34
Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 380 g,
344 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-41-6;
prezo ĉe FEL: 19,20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (EPUB aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 11,50 EUR

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Svislando: granda anonima letero

7

Post vigla kampanjo, svisaj civitanoj finfine decidis per referendumo aldoni novan frazon al la landa konstitucio: „Malpermesite estas konstrui minaretojn”. La decido ne aplikeblas al la kvar ekzistantaj minaretoj.

Ni fosu nian konton!

10

La distrikto Rejnlando-Palatinato situas en la sud-okcidenta Germanio antaŭ la pordoj de la urboj Mannheim, Ludwigshafen, Heidelberg kaj Karlsruhe. Tie, pro bona, ebena grundo kaj varma klimato, oni produktas por la regiona kaj pli foraj merkatoj legomojn, terpomojn, laktukojn kaj fruktojn. La bonstata regiono fieras pri la titolo „ĝardeno de Germanio”. Tiu ĉi paradizo ja bele aspektas, tamen ne sen kosto ĝi estas kreita.



Vakcinado: protektas nur Dio

14

Fine de oktobro estas vakcinitaj kontraŭ poliomjelito la unuaj infanoj en Burundo. Sekvas kampanjo por vakcini ĉiujn infanojn post la malkovro de poliomjelito en la nord-orienta burunda provinco Cibitoke. La provinco apudas la Demokratian Respublikon Kongo, kie jam estas registrita la malsano, kaj Ruandon.



FOTO DE LA KOVRILO: RITA RÖSSLER-BUCKEL

politiko

SVISLANDO	7
Granda anonima letero	
KOMUNISMO	7
Memore al la viktimoj	
ALBANIO	8
Parlamento preskaŭ unupartia	

moderna vivo

ĈINIO	9
Prospero kaj progreso post 60 jaroj	
ALBANIO	9
Rekantajo	
AGROKULTURO	10
Ni fosu nian konton!	
AŬSTRIO	12
Libreto lerneja	
USONO	12
Narkotaj Dakotoj	
LITOVIO	13
Prezoj prezidantaj	
KULTURO	13
Princo de rakontoj	
GRIPO	13
Kurac-ajlo	
VAKCINADO	14
Protektas nur Dio	
BURUNDO	15
Familioj je la limo	

ekonomio

LITOVIO: Mono el aero	16
MINEKSPLUATADO: Ora febzo en Litovio	16

libroj

Aŭtoro je vere monda nivelo	17
La verde farbita birdo	18

medio

AFRIKO	19
---------------------	----

enigmoj

Solvo de la litera sudoko (Monato 7/2009)	19
Solvo de "Trastreku" (Monato 9/2009)	19
Litera sudoko	20
Solvo de "Bone kalkulu" (Monato 5/2009)	20

spirita vivo

JAPANIO: Funebro en Japanio	21
Kosmologio de nia jarcento	22
ALBANIO: Religiaj eldonaĵoj en librofoiro	22

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Anoncetoj	23

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albura Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
 - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalininograd, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
 - > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija@hes-keu.hr.
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: beckford@telkomsa.net.
 - > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Progreso medicina



Mi suferas je malofta malsano, nomata „kuntiriĝo laŭ Dupuytren“ [dipitren]. En mia libro *El viva vivo ĵurnalista* mi priskribis tiun „dipitrenan kuntiriĝon“: ĝi kaŭzas, ke la fingroj kurbiĝas. Oni ĝis hodiaŭ ne povas kuraci la malsanon, nur operacii la manojn, eltranĉante la „sovaĝajn“ partojn, tiel ke la fingroj denove estas rektaj.

Ĉe mi la malsano estas aparte insistema, tiel ke en novembro 2009 mi suferis jam la naŭan operacion. 40 jarojn antaŭe, en 1969, mi havis la unuan; tiam mi estis 29-jara. Kvankam do oni ne trovis kuraĉilon por dipitrena kuntiriĝo, tamen mi povas konstati grandan progreson medicinan, komparante la unuajn kun la lastaj operacioj. Tiam necesis anesteziisto kaj du ĥirurgoj, oni narkotis la kompletan korpon, la operacio daŭris plurajn horojn, mi devis porti (tre ĝenajn) kontraŭtrombozajn ŝtrumpojn, devis resti dum pluraj semajnoj en la malsanulejo, ricevante ĉiun tagon injekton kontraŭ trombozo. Tio estis tre teda, ĉar mi ja ne bezonis kuŝi en lito, sed povis libere moviĝi, nur ne uzi la ope-

raciitan manon. Manĝaĵojn devis prepari flegistoj tiel, ke mi povu enbuŝigi ĉion per unu mano. Krome por ĉiu tago en kliniko oni fakturis por mi certan sumon, kiun ne pagis la malsanasekuro.

Poste, ekde la kvara operacio, almenaŭ mi ne plu bezonis restadi dum semajnoj en kliniko, sed nur dum tri ĝis kvar tagoj. Intertempe la ĥirurgoj disponis jam pri okulmikroskopoj, tiel ke la risiko difekti tendenojn kaj nervojn estis jam multe malpli granda, kaj ili povis operacii pli rapide. Kaj anesteziistoj progresis tiel, ke ili kapablas narkoti nur la koncernan brakon. Por mi tio estis granda avantaĝo, ĉar post ĉiu ĝenerala narkozo suferis mia memorkapablo (problemo precipe por ĵurnalisto!).

La du lastajn operaciojn mi havis ne en granda (relative anonima) kliniko, sed en eta ambulatorio. Mi eniris ĝin frumatene, ĉeestis nur unu ĥirurgo kaj flegistino, la operacio daŭris nur unu horon kaj mi povis iri hejmen jam post tagmezo. Superfluis ŝtrumpoj kaj injektoj kontraŭ trombozo. Kompreneble estis multe pli komforte resaniĝi en la propra hejmo, kie la edzino povis helpi min. Do ni vidas per tiu ĉi mia ekzemplo, kiom progresas medicino laŭ multaj aspektoj. Cetere, sed ne malgrave, la nuna metodo estas krome malpli kosta. Do trankvile mi povas atendi la (jubilean) dekan operacion ...

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro propriniciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.



Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikajn bildojn de la periodo intermilita. Ili sumiĝas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm,
pezo 444 g, 430 paĝoj,
ISBN: 978-90-77066-38-6;
prezo ĉe FEL 29 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub): prezo ĉe FEL: 14,50 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Granda anonima letero

Post vigla kampanjo (MONATO 2009/12), svisaj civitanoj finfine decidis per referendumo aldoni novan frazon al la landa konstitucio: „Malpermesite estas konstrui minaretojn”. La decido ne aplikeblas al la kvar ekzistantaj minaretoj.

Kutime svisoj rifuzas ekstremajn proponojn, sed ĉi-foje majoritataj 57,5 % akceptis diferencon disponon kontraŭ la islama komunumo.

Nur en kvar el la 26 kantoj (regionoj) la voĉdonantoj malakceptis la proponon: Bazelo, Ĝenevo, Vaŭdo kaj Neŭŝatelo. Rimarkindas ankaŭ, ke ĉefaj urboj rifuzis la proponon.

Tiu ĉi voĉdona rezulto estas granda surprizo. Preskaŭ ĉiuj partioj, firmaoj, sindikatoj kaj la registaro mem kontraŭis la proponon de dekstraj ekstremuloj. Eĉ opini-sondoj ne prognozis la rezulton.

La decido ne aplikeblas al la kvar ekzistantaj minaretoj.

Timo

Ŝajnas, kvazaŭ la voĉdonintoj sendis „grandegan anoniman leteron” al la svislandaj islamanoj. Tiel, kredeble, svisoj esprimis sian timon antaŭ islamanoj viditaj nur en televidaj elsendoj: verŝajne ili neniam vere konatiĝis kun islamaj loĝantoj de sia lando.

Necesas nun pli detale analizi la rezultojn. Svislando ŝajnas esti la unua lando decidinta pri diskriminacia dispono kontraŭ iu aparta religio. Aŭtoritatoj nun antaŭvidas malfacilaĵojn koncerne internaciajn rilatojn kaj komercon de svisaj firmaoj, precipe en Mez-Oriento.

Eblas ankaŭ, ke la nova regulo estos findiskutita ĉe la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj en Strasburgo. Kvankam minaretoj ne estas devigaj por islamanoj, evidentas, ke tiu ĉi decido estas diferencigo al ili neakceptebla. La vojo estos ankoraŭ longa ĝis finaranĝo de la afero. Tiaj estas la riskoj de rekta demokratio.

Daniel SCHOENI BARTOLI


Memore al la viktimoj



En la albana ĉefurbo Tirano okazis en novembro memoriga kunveno dediĉita al viktimoj de komunistoj. Pereis antaŭ 65 jaroj en 1944, dum la liberigo de Tirano, 37 homoj, i.a. intelektuloj, juristoj kaj ĵurnalistoj. Komunistoj ilin arestis kaj mortpafis ekster iliaj hejmoj en parto de la urbo jam liberigita de partizanoj. Senkulpaj, ili ne rezistis al la komunistoj. La teruraĵo anticipis la forkapton de la ŝtatpotenco fare de la komunistoj kelkajn tagojn poste.

Komunismo ankoraŭ aktualas en Albanio pro nostalgiaĵoj, eldonaĵoj kaj elsendoj. Ĝin flegas ekspartianoj aŭ iliaj gefiloj jam ekonomie fortiĝintaj kaj enirintaj en diversajn politikajn partiojn kaj aliajn instituciojn.

Bardhyl SELIMI



Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net.



ALBANIO

Parlamento preskaŭ unupartia

Rezulte de balotoj en junio 2009 la demokratoj de Sali Berisha ricevis 70 lokojn el la 140 en la parlamento. Pro tiu ĉi malvenko la demokratoj sukcesis krei novan registaron nur helpe de unu el la opoziciaj partioj (Socialista Movado por Integriĝo, estrata de Ilir Meta).

La socialistoj de Edvin Rama (ekde 2000 la urbestro de Tirano), kun 64 lokoj, formale agnoskis la rezulton de la balotoj. Tamen, kiel kondiĉo por partopreni en la nova parlamento, la socialistoj insistis, ke balotilaj kestoj en kelkaj urboj estu malfermitaj. Tion kontraŭis la demokratoj, dirante, ke ĉio jam estas decidita de balotkomisionoj.

Deputitoj

Intertempe Rama, kiu laŭstatute rezignu pri sia posteno post la malvenko, kvankam malgranda, kontraŭe rekandidatiĝis kiel partiestro kaj instigis siajn deputitojn ne aliĝi al la parlamento. Dume, socialistoj amase, tra la tuta lando, protestis, postulante, ke oni malfermu la balotilajn kestojn. Reciproke manifestaciis ankaŭ demokratoj, okaze de sia partia kongreso, apoge al la estraro. Tio signifas, ke la parlamento funkcias kvazaŭ unupartia, kiel dum la tempo de komunismo. Albanoj kaj iliaj amikoj eksterlandaj esperas, ke la situacio malstreĉiĝos, tiel ke la lando iam povos aliĝi al Eŭropa Unio.

Bardhyl SELIMI

La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio,

**butiko@fel.esperanto.be
aŭ www.retbutiko.net
kontraŭ 9,50 eŭroj +
afranko.**



Rezulte de balotoj en junio 2009 la demokratoj de Sali Berisha ricevis 70 lokojn el la 140 en la parlamento.

ĈINIO

Prospero kaj progreso post 60 jaroj

La unuan de oktobro 1949 Maŭ Zedong laŭte, klare kaj fiere deklaris, ke naskiĝis la Ĉina Popola Respubliko. Tiu ĉi tago estis celebrinda kaj memorinda por multaj ĉinoj.

Pasis 60 jaroj. Kiaj ŝanĝoj okazis intertempe en Ĉinio? Malgraŭ tio, ke mi, 49-jaraĝulo, ne trapasis la tutan periodon, mi povas respondi al la demando.

Antaŭ la Ĉina Popola Respubliko miaj geavoj naskis ses infanojn. Nur tri plenkreskis: la aliaj tri mortis pro malsato aŭ malsano. Ankaŭ plenkreskuloj tiam vivis ĝenerale nur ĝis sia 45a jaro. Miaj gepatroj diris, ke kiel aliaj ili loĝis en kaduka dometo kaj ofte malsatis. Cetere ili neniam vizitis lernejon kaj eĉ ne povis skribi sian nomon.

Viando

Eĉ mi memoras, ke en mia malgranda hejmo staris sole litoj kaj manĝotablo. Mia patrino faris niajn vestaĵojn kaj ŝuojn kaj ni manĝis rizon kaj legomojn plantitajn de miaj gepatroj. Viando malofte videblis sur nia manĝotablo. Do, malgraŭ tio, ke en la komencaj jaroj de la Ĉina Popola Respubliko, mia vivo estis malriĉa, mi tamen sufiĉe manĝis kaj ankaŭ mia sano estis protektata. Kiel miaj proksim-aĝuloj, mi povis viziti lernejon kaj multaj el ni diplomitiĝis el mezlernejo.

Ekde 1978 la ĉina registaro praktikas politikon de tiel nomata pordo-malfermo kaj reformado. Pro tio eksterlandaj kompanioj kun altaj teknikaj kaj scien-

caj kapabloj komencis starigi fabrikojn en Ĉinio. Stariĝis ankaŭ grandnombraj vilaĝaj fabrikoj. Tial preskaŭ ĉiu ĉino okupiĝis pri konstruado de la ekonomio.

Vojoj

Tiamaniere klimatiziloj, lavmaŝinoj, koloraj televidiloj, elektraj ventumiloj, telefonoj, fridujoj kaj aliaj familiaj aparatoj nun bone funkcias en ĉinaj hejmoj. Vojoj estas konstruataj, altaj domoj arbaras en urboj kaj novaj domoj punktas la kamparon.

Nuntempe ĉinoj ĝuas vivon pli kaj pli riĉan, dum Ĉinio ludas rolon pli kaj pli gravan en mondaj aferoj. Antaŭ 60 jaroj ŝanĝiĝoj tiaj apenaŭ imageblis.

Xu Jinming/pg

ALBANIO

Rekantaĵo



Kiam oni festis antaŭ nelonge la 20an datrevenon de la falo de la berlina muro, kantis en la albana ĉefurbo Tirano la itala artisto Albano Carrisi.

Tamen antaŭ 20 jaroj kantis en Albanio la sama Carrisi, invitive de la tiam totalisma reĝimo, kiu volis sin prezenti modera kaj liberala. La kantisto, intervjuate en la albana televido, memoris sian unuan viziton. Tiam, li diris, li vidis ĉinajn kamionojn, sur kiuj veturis kamparanoj kaj aliaj laborantoj. Li menciis ankaŭ gelernantojn, pale kaj serioze mienantajn, kaj enviciĝintajn kvazaŭ soldatoj, antaŭ ol eniri la klasĉambron. Cetere la silenton de la homoj li memoris, kiam alproksimiĝis fremdulo.

Unu jaron post la unua vizito de Carrisi miloj da albanoj fuĝis eksterlanden kaj en decembro 1990 establis sin pluirisma politika sistemo.

Bardhyl SELIMI

Ni fosu nian konton!

La distrikto Rejnlando-Palatinato situas en la sudokcidenta Germanio antaŭ la pordoj de la urboj Mannheim, Ludwigshafen, Heidelberg kaj Karlsruhe. Tie, pro bona, ebena grundo kaj varma klimato, oni produktas por la regiona kaj pli foraj merkatoj legomojn, terpomojn, laktukojn kaj fruktojn. La bonstata regiono fieras pri la titolo „ĝardeno de Germanio”. Tiu ĉi paradizo ja bele aspektas, tamen ne sen kosto ĝi estas kreita.

La kamparanoj ne plu konsistigas tradiciajn familiojn. Ili estas agraj fabrikistoj kun grandaj terenoj, kun multaj kaj fortaj maŝinoj. Januare oni preparas la sablon por la asparago-bedoj, ilin kovrante per sunkolektaj tukegoj, kiujn

frusomere oni povas renversi por protekti kontraŭ tro da suno.

Sur la tereno oni kreskigas dum unu jaro tri aŭ kvar specojn de nutroplantoj. Akvon ne sole disponigas la ĉielo, sed tubaro, prenanta la fluidaĵon el iamaj brakoj de la rivero Rejno. Post ĉiu rikolto oni ne per plugilo simple trasulkas la grundon, sed kvazaŭ muelas ĝin ĝis polvo. Neniu skarabo, neniu vermo havas vivoŝancon; ankaŭ ne pli grandaj bestoj.

Kloakoj

Nenaturan sterkon liveras ĥemiaj fabrikoj: la mondkonata kompanio BASF troviĝas tuj apude. Oni uzas eĉ la restaĵojn el grandaj kloakoj. Ne plu

unuopaj familioj kune kolektas la jaran rikolton por la propra bezono, sed foje cento da helpantoj en unu kampo, dungataj ofte nur por kelkaj horoj, sekurigas la sezonan rezulton. Helpas abunda maŝinaro. Veturantoj rulbendoj transportas la plantojn el manoj al kamionoj, per kiuj ili estas transportataj al komercejoj kaj bazaroj.

Nur tio atingas la rulbendon, kio estas norma. Ankaŭ nuntempe agraj inĝenieroj ne kapablas centelcente devigi norman kreskadon de la fruktoj. En la pasinteco la iom malgrandajn, tro grandajn, nenormajn, tro maturajn, ne ĝustakolorajn aŭ ne plene agrablaspektajn fruktojn oni kolektis por aliaj celoj: por hejmbestoj, por donaco anstataŭ vendado, por aliforma konservado. Hodiaŭ ne plu.

Nuntempe la helpantoj kun siaj maŝinoj atakas la kampojn kvazaŭ armeo. En komuna takto, senhalte, meĥanike, ili trakombas la terenon. Kio aspektas vendebla, tion ili enkestigas, survoĵigas. La resto falas grunden, destinita al perejo, tiel ke la kampoj similas ja al batalkampoj. Tiu ĉi resto ofte superas kvante la tutan vendeblan jaran rikolton.

Fruktoj

Ĉiam pli evidentiĝas, ke la iama lukto kun la naturo fariĝis batalo kun la merkato. Se la merkato ne volas, ne bezonas, havas aliajn preferojn, eĉ la plej belaj fruktoj ne akiras aprezon. Modernaj agraj fabrikistoj kompatas sian bankkonton, ne siajn belajn fruktojn. Se rikolto ne estas bonpreze vendebla, la fabrikistoj rigore detruas ĝin, esperante, ke la venonta sezono kompensas la aktualan perdon.

Ankaŭ tiu postkamparana mondo funkcias laŭ la reguloj de la kapitalisma



Grandaj maŝinoj elgrundigas terpomojn, kiuj fojfoje ne atingas la vendejojn.

ekonomio. La kialoj por la detruado povas vari: troa produktado, maltrafo de la bezono, eksterlanda konkurenco, perdo de freŝeco, malkonvena konsisto, nekontentiga prezo – ĉio rezultas la saman pereigon.

Plugmaŝinoj

En la menciita distrikto aŭtune estas videblaj ĝishorizonte terpomkampoj kun elterigitaj fruktoj belegaj kaj sanaj, tamen ne rikoltitaj. Jam venonttage gigantaj plugmaŝinoj ĉion reenterigis. Same okazis al laktukobedoj kaj al multaj kampoj kun rafanetoj, eĉ jam vendoprete kunligitaj.

La romantika bildo pri iamaj feliĉaj familiaj bienetoj certe ne povas esti modelo en funde ŝanĝiĝinta mondo. Sed kie la nutraĵo fariĝas nur objekto de spekulado, perdiĝas homaj valoroj, gravaj por socia kunekzistado. Nutraĵo ne estas simpla varo, ne senlime regebla konsumaĵo. Tion nepre rekonu en la estonteco loĝantoj de homfaritaj paradizoj.

Franz-Georg RÖSSLER



JAYDOT

Se la merkato ne volas, ne bezonas, havas aliajn preferojn, eĉ la plej belaj fruktoj ne akiras aprezon.

Tiuj ĉi rikoltitaj terpomoj pro nenormajoj aŭ pro la ŝanĝiĝema merkato baldaŭ reeniros la grundon.

BITA RÖSSLER-BÜCKEL



AUSTRIO

Libreto lerneja

Okaze de la 30-jariĝo de la Internacia Centro de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno kaj de la aŭstra prezido de la Sekureca Konsilio de UN en novembro aperis libreto kun instrumaterialoj por mezlernejoj. Preparis la tekstojn fakuloj de la ministerioj pri eksterlandaj aferoj kaj pri instruado, helpe de la informservo de UN en Vieno.

En ĉapitroj, kiuj rilatas al aŭstraj instruplanoj, la gelernantoj ricevas superrigardon pri la historio, strukturo kaj ĉeftaskoj de UN samkiel pri la rolo de Aŭstrio en ĝi.

Simulado

La materialoj, sub titolo „Kune fortaj – Unuiĝintaj Nacioj”, estas verkitaj por infanoj ekde la aĝo de 13 jaroj. Aperas ekzemple kvizo pri simulado de la Sekureca Konsilio, per kiu gelernantoj povas pli bone kompreni la decidajn procezojn en la plej altranga UN-organo.

La aŭstra ministro pri eksterlandaj aferoj, Michael Spindelegger, kiu kunlanĉis la libron, diris: „Ĝuste la temoj, kiuj la gejunulojn interesas – klimatprotektado, batalo kontraŭ malriĉeco kaj sekurigo de paco – postulas aktivan internacian engaĝon. Ni devas havi la komunan deziron peri ilin al la lernejoj.”

Ekzemplerojn de la libreto oni sendis al ĉiuj mezlernejoj en la lando. Reagoj de instruistoj kaj lernantoj tre pozitivaj.

Evgeni GEORGIEV

USONO

Narkotaj Dakotoj



WARNER KUNZ

La pasintajn dek jarojn la restantaj siuoj defiis la registaron kaj komencis kultivi kanabon por industria uzo,



LIVINGGOODSHADOWS

... evidentiĝis, ke la kanabo estis uzata ankaŭ por krei narkotaĵojn.

En 1980 la usona registaro donacis monon kaj teron en Norda kaj Suda Dakoto al indianaj triboj, kiuj centon da jaroj antaŭe perdis sian tradicion terenon. Fakte la nomo de la du ŝtatoj, Dakoto, devenas de la sia „dakóta”, kiu signifas „aliancano”.

Tamen malgraŭ la helpo de la registaro la triboj restas en ekstrema malriĉeco. Senlaboreco atingis 80 % de la triboj, kiuj provis kultivi la teron, sed la grundo en la rezervejoj ne tiom facile prilaboreblas kiom en la regionoj okupitaj de blankuloj.

Do en la pasintaj dek jaroj la restantaj siuoj defiis la registaron kaj komencis kultivi kanabon por industria uzo, ekz. ĉe papero- aŭ parfumo-fabrikoj. Tamen evidentiĝis, ke la kanabo estis uzata ankaŭ por krei narkotaĵojn.

Konstitucio

Rezulte, la instancoj eniris la hejmojn de siuoj kaj arestis tribojn. Sed la usona konstitucio malpermesas, ke la instancoj eniru privatajn hejmojn sen kortuma arest-mandato.

La siuoj plendis ĉe distrikta federala kortumo, sed vane. Pro tio ili daŭre kultivas kanabon, argumentante, ke ilia industria kanabo, ĉerpita de folioj, ne enhavas la pli toksajn ĥemiaĵojn troveblajn ĉe kanabo deprenita de la tigo de la planto.

La kortumo tamen rekomendis, ke la siuoj provu ĉe la usona parlamento, aŭ kongreso. Intertempe, ĝis decidis la kongreso, ŝajnas, ke eliri el malriĉeco ne facilas al la restantaj siuoj.

Elson B. SNOW

Prezoj prezidentaj

Aŭkciitaj estas objektoj, i.a. aŭtoj, komputiloj, fotiloj, mebloj kaj artaĵoj, ne plu bezonataj, kiuj apartenis al litovaj prezidentoj. La aĵojn iam pagis impostpagintoj de Litovio.

Partoprenis la prezidejan aŭkcion ĉ. 200 aĉetemuloj. Plej grandan intereson vekis la 20 aŭtomobiloj, aparte la grizkolora ŝipo „Nissan Patrol” de eksa prezidento Algirdas Brazauskas. La prezo komenciĝis ĉe 900 eŭroj tamen fine atingis pli ol 8000.

Venditaj estas ankaŭ du rafinitaj lampoj, kiujn iam elektis la edzino de la elpostenigita prezidento Rolandas Paksas. Ilin oni vendis kontraŭ pli ol 500 eŭroj. Eĉ nefunkciivan neĝo-forigilon akiris juna viro. Komence ĝi kostis 15 eŭrojn, sed la prezo altiĝis ĝis 460.

Kelkajn aĵojn oni ne volis, inkluzive de dormoĉambra meblaro. Tamen entute la aŭkcio rikoltis ĉ. 26 000 eŭrojn por la prezidejo kaj por la ŝtata kaso.



LAST



LAST

La aŭtoj de la prezidento aparte interesis la aĉetemulojn.

LAST



LAST

Luksaj lampoj, kiuj apartenis al la prezidant-edzino, kaptis la atenton de interesatoj.

Princo de rakontoj

Internacian premion pri beletra gajnis la albana verkisto Ismail Kadare. La 73-jaraĝulo ricevis la premion „Princo de Asturio 2009” dum ceremonio en Hispanio. Pri la verkaro de la premiito notis la ĵurio: „Kadare rakontas per ĉiutaga lingvaĵo, sed plene de lirikismo, la tragedion de sia tero.” Kadare sukcesis gajni la premion inter pli ol 30 kandidatoj el diversaj landoj.

Bardhyl SELIMI

GRIPO

Kurac-ajlo

La t.n. porkan gripo ne evitis Litovio. Homoj ĉie malsaniĝis, krom ĉe unu loko – infanvar-tejo en la ĉefurbo Vilnius. Eĉ ne unu el la 71 infanoj suferis pro la gripo kaj, kiam oni esploris, la mistero tuj klariĝis. Kiam oni malfermis la pordon de la ejo, trafis la nazon fortaodoro de ajlo.

La ajlan rimedon elpensis du junaj vartistinoj. Sciante, ke ajlo protektas kontraŭ virusoj, ili decidis provi ĝin kontraŭ la gripo. Tiel sur la kolon de ĉiu infano ili pendigis kestetojn entenantajn freŝan ajlon. Dum ludoj ili fojfoje petis, ke la infanoj enspiru la ajlo-odoron. Post kelkaj tagoj en la kolkestetoj aperis nova freŝa ajlero.

LAST

VAKCINADO

Protektas nur Dio

Fine de oktobro estas vakcinitaj kontraŭ poliomjelito la unuaj infanoj en Burundo. Sekvas kampanjo por vakcini ĉiujn infanojn post la malkovro de poliomjelito en la nord-orienta burunda provinco Cibitoke. La provinco apudas la Demokratian Respublikon Kongo, kie jam estas registrita la malsano, kaj Ruandon.

Pli ol miliono kaj duono da burundaj infanoj ricevis la vakcinon, kiel ankaŭ infanoj en la provinco Sud-Kivuo (Kongo). Tamen en Burundo la vakcinoj ne sufiĉis. La instancoj uzis malnovajn sta-

tistikojn, kiuj enkalkulis nek la kreskon de la popolo nek la ĉeeston de hejmenvenintaj rifuĝintoj el Tanzanio.

Okazis dua vakcinado-programo en novembro, kiam la instancoj estis pli bone preparitaj. Tamen multaj gepatroj ne revenigis siajn idojn al la vaccinejoj. Ĉirkulis onidiroj, ke infanoj vakcinitaj spertas problemojn pri siaj intestoj. Tio ja okazis en unu vilaĝo en la provinco Makamba.

Pekado

Alia problemo fontas el preĝejoj,

kiuj instruas, ke nur Dio protektas kontraŭ malsanoj, kaj do ke homaj rimedoj ne helpas. Pastroj eĉ aldonas, ke pekas tiuj, kiuj siajn infanojn vakcinigas. Kaj, malgraŭ la klopodoj de la registaro, multaj gepatroj en vilaĝoj ankoraŭ ne komprenas la gravecon de vakcinado.

Poliomjelito disvastiĝas per konsumado de manĝaĵo kaj akvo infektitaj. Ĝi estas forte infekta kaj facile difektas la imun-sistemon de tiuj, kiuj ne estis vakcinitaj. La malsano endemias en kvar landoj de la mondo: Niĝerio, Barato, Afganio kaj Pakistano.

Jérémie SABIYUMVA



Unusola infano povas infekti je poliomjelito 200 nevakcinitajn infanojn. Tial atendas vakcinadon burundaj patrinoj kun siaj idoj.

Familioj je la limo

Laŭ statistikoj Burundo estas inter la plej dense loĝataj afrikaj landoj kun ĉirkaŭ ok milionoj da homoj. Laŭ demografoj, se oni ne limigos la nombron de infanoj, la loĝantaro ĝis 2015 duobliĝos. Tio ne surprizu: en multaj regionoj de Burundo oni ankoraŭ konsideras infanojn kiel riĉaĵon.

En grandaj urboj oni komprenas la rezultojn de multinfanaj familioj. En urboj, kie la vivo pli kostas, infanoj formas ŝarĝon, ĉar necesas pagi edukadon, loĝadon, manĝaĵon ktp.

En vilaĝoj, kie – kontraste al urboj – vivas malmulte da edukitaj homoj, virinoj diras, ke, kiam ili gravediĝas, ili nepre nasku la infanojn. Aliaj aldonas, ke, se Dio volas, ke ili ne nasku, nur tiam ili haltos.

Kuracistoj

La vilaĝaninoj asertas, ke ili naskas multajn infanojn, ĉar duono de la infanoj mortos. Mankas en la vilaĝoj kuracistoj,

kaj malsato detruas la imunsistemon de multaj infanetoj. Cetere kelkaj religioj instruas, ke nepras naski kaj tiel plenigi la mondon.

Tamen estas la virinoj, kiuj zorgas pri la bonfarto de burundaj familioj. Kiam ili senĉese gravediĝas, ili ne povas sin kontentige dediĉi al siaj familioj kaj idoj. Kaj, pro la multaj infanoj, mankas sufiĉe da manĝaĵoj, kio siavice malbone efikas sur la sanon ne nur de la patrino, sed ankaŭ de la tuta familio.

Tio signifas ankaŭ, ke fojfoje pli aĝaj infanoj prizorgas pli junajn. Tial la plej aĝaj ne ĉiam vizitas lernejojn kaj, kiam la gepatroj laboras en la kampoj, ili devas prepari manĝaĵojn por la pli junaj gefratoj.

Bazlernejoj

Eĉ kiam infanoj ja iras al lernejoj, grandas la klasoj. Foje ekzistas nur ses instruistoj por 700 lernejaninoj. Pro la nepagipovo de la gepatroj, la ŝtato sub-

vencias ĉiujn infanojn en bazlernejoj. Tamen tio ne sufiĉas, kiam la stomakoj malplenas. En kelkaj vilaĝoj, la monda nutraĵo-programo manĝigas lernejaninojn.

Tro da infanoj kondukas al la grandurba fenomeno de senhejmaj, surstrataj infanoj, kiuj foje kulpas pri raboj kaj mortigoj. Ĝenerale infanoj tiaj ne scipovas legi aŭ skribi, kaj do lernas nur kiel prepari ordinaran manĝaĵon, kaj – por knabinoj – kiel prepari manĝaĵojn por infanoj. Ili pasigas sian junaĝon, laborante en hejmoj kontraŭ nesignifa salaĵo, kiun ili plusendas al siaj familioj en la vilaĝoj.

Iniciato

Antaŭ kelkdeko da jaroj ekfunkciis iniciato por interspacigi naskojn en Burundo. Atingita tamen estas preskaŭ nulo. Ĝi sukcesis nur en la grandaj urboj, tamen la ĉefa problemo kuŝas en la vilaĝoj.

Necesas energie kaj forte konsciigi al la popolo, ke nuntempe ne valoras naski infanojn, se ilin oni ne povas prizorgi. Ankaŭ la ŝtato povus interveni por laŭleĝe limigi la nombron de infanoj permesataj al ĉiu paro kaj por puni tiujn, kiuj ne respektas la limon. Tio ja sukcesis en kelkaj landoj, kiel Ĉinio, kie oni regis la senbridan kreskon de la popolo.


Tamen en Burundo la registaro malrekte kontribuas al la terura kresko de la popolo. Ĝi subvencias ĉiujn akuŝojn en publikaj hospitaloj kaj la flegadon de infanoj malpli ol kvin jaraĝaj.

Jérémie SABIYUMVA



Pro manko de familia planado plenplenas lernejoj en Burundo.

**Artikolojn pri la vivo en
via regiono sendu al
moderna_vivo@monato.net.**



„Aero de Vilnius”, kuriozaĵo por turistoj.

LITOVIO

Mono el aero

La titolo „Ĉefurbo de Eŭropa Kulturo”, pasintjare atribuita al la litova ĉefurbo Vilnius, havigas novajn ideojn al lertaj komercistoj.

Entreprenisto Eduardas Gromyka, fotisto Paulius Kalmantas kaj dizajnisto Ieva Naujokaitė decidis riĉiĝi per aero kaj komencis negoci per buntaj ladskatoloj plenaj je aero de Vilnius, Kaunas, Klaipėda, Šiauliai kaj Panevėžys.

La skatolo „Aero de Vilnius” indikas, ke enestas 32 % da aero el la antikva urboparto, 27 % el la nova urbo, 22 % el la kvartalo Žvėrynas kaj 19 % el la kvartalo Antakalnis. Tamen ne ĉiu kuraĝas malfermi la misteran skatolon kaj testi la aeron; ĝi ja kostas iom pli ol

7 eŭrojn. La iniciatintoj tiel klarigas la altan prezon: „Aero de Vilnius, samkiel de alia parto de Litovio, ne povas kosti malpli, ĉar ĝi estas multe pli pura ol tiu en aliaj grandurboj de Eŭropo”. La enskatoligita aero estas aĉetata precipe de elmigrintoj kiel donaco por proksimuloj, por kiuj litova aero provokas sentimontojn kompareblajn al nigra sekala pano aŭ iometo da litova grundo. Kial do ne aĉeti eĉ kelkajn pecojn? Tia donaco ne pezas multe kaj ĝia konsumo limdato estas post 100 jaroj!

LAST

MINEKSPLUATADO

Ora febro en Litovio

La ekonomia krizo ne preterlasis ankaŭ Litovion, kaj ĝi instigas al drastaj ideoj. La kompanio „Traku akmuo” decidis elfosi oron en Litovio, lando, kiu neniam antaŭe famiĝis pro ora produktado. La unuaj miligramoj da oro jam estis testitaj en laboratorio.

La estro de la kompanio, Bronislovas Zubas, agnoskis, ke la kompanio, kiu ĝis nun elfosis kaj vendis gruzon kaj sablon, la novan agadon entreprenis pro la malfacila ekonomia situacio – konstruado ja draste falis. Li rememoris iam lanĉitan ideon, ke litova sablo povus esti taŭga por eligi oron.

Geologoj efektive malkovris, ke en gruzaj kaj sablaj tavoloj de nordorienta Litovio eblas trovi ĉirkaŭ 0,5 gramojn da oro en unu tuno da sablo. Kompare kun la rezultoj en aliaj partoj de Litovio tiu kvoto estas sufiĉe alta. La oron iam

alportis glaĉero moviĝinta el orriĉaj regionoj de Svedio kaj Finnlando.

Por esplori la mintavolon la litova kompanio akiris kanadan aparaton por metalkoncentrado. En ĝi oni turnas sablon kun akvo kaj la centrifuga forto koncentras sablerojn pli pezajn ol kvarco en unu lokon. Tiuj pli pezaj eroj estas metaloj aŭ, laŭ geologa ĵargono, malhelaj mineraloj, aglomeraĵo de diversaj metaleroj, en kiu oraj polvoj kutime estas algluitaj al aliaj metaloj. Por testi la koncentraĵon oni sendis ĝin al kanada laboratorio „Activation Laboratories Ltd”.

El Kanado venis pozitiva respondo: en la liverita kvanto estas 0,6 gramoj da oro, ankaŭ volframo kaj multaj aliaj elementoj el la tabelo de Mendelevo. Krome, germanaj spertuloj kuraĝigis la litovojn pluiri en tiu kampo dirante, ke en sama kvanto da germana sablo oni trovas nur 0,1 gramojn da oro kaj ili ekspluatas.

Nun oni akiros pli grandan aparaton por metalkoncentrado kaj printempe de 2010 komencos la laboron. Oni intencas trakribri ĉirkaŭ 100 tunojn da sablo dum unu horo. Por la fina laborstadio – eligo de la oro – necesas multekostaj teĥnologioj. Tial la kompanio intencas la metalkoncentraĵon vendadi al okcidentaj landoj. Malgraŭ la nova kaj espreble profitodona agado, la kompanio ne intencas forlasi sian ĉefan agadon – ekspluati kaj vendadi gruzon kaj sablon por konstruado.

LAST

Aŭtoro je vere monda nivelo



Mi pensis, ke jam iom mi scias pri la historio de l' 20a jarcento; mi pensis, ke jam iom mi legis pri ambaŭ grandaj militoj, kiuj vundis nian kontinenton tiu-jarcente, pri la senceco de la interbuĉado de la Unua Mondmilito, pri estiĝanta Naziismo k.s.; eble mi eĉ pensis, ke mi jam legis pri tio tro, sed mi konstatis, ke denove mia korpo reagas harhirtige: Trevor verkas terure – terure realec-proksime, terure timtremige: oni kunvivas la riskan periodon, kiam Berlino ne nur estis kulturbredejo de Eŭropo plej riĉa, sed ankaŭ nesto de vipuroj plej hida. Oni aŭskultas la raportaĵojn el fora Aŭstralio, el tempo multe pli posta pri grupo ĉirkaŭ maldekstrema revueto *Novaj Folioj* (la „kajeroj”, kiel amplene oni nomas ilin): legante, oni kunvivas, kunvidas

disvolviĝantan memkonscion de junuloj, ŝanĝiĝantajn sintenojn en la socio, ekeston de minacoj kaj danĝeroj ktp. Trevor denove malkovras por ni, kio estis la 20a jarcento.

Kaj en tio li ne nur estas majstra manipulanto (li pardonu la esprimon) pri la montrado de diversaj bildoj, scenoj, kiuj kompletigas unu la alian: ili kuniĝas en impona klimakso. Kaj samtempe li estas stile tre zorgema, ne uzas superfluaĵajn neologismojn, sed, aliflanke, ankaŭ ne nepre limigas sin je minimumo. Almenaŭ mi estas kontenta, ke foje eĉ kelkajn vortojn li uzas nacilingve por iom „kolorigi” la medion. Nur unu veran bedaŭrindaĵon mi trovis: sur paĝo 181 la faman pacifisman romanon *Im Westen nichts Neues* el 1929 de E.M. Remarque li nomas piednote *Nenio nova el okcidento*, sed efektive ĝi aperis en Esperanto jam samjare sub pli ĝusta titolo: *En okcidento nenio nova*. Parenthese, la malmultaj piednotoj ie tie tute ne bremsas la legadon, male: ili utilas. Estas bonvene eĉ en romano legi spicajn detalojn.

Granda ĵurnalisto

La rakontata tempo de la verko iras de „antaŭ la Granda Milito, nun nomata la Unua Mondmilito” (paĝo 15) ĝis en la nunon de la rakontanto, 1990 (paĝo 9). Tiu nuno daŭre rolas fone, kaj tial ne temas pri nur „denove historia romano pri tiuj militoj”. Sed la vera temo estas la *personeco* de vere granda ĵurnalisto, kia li estis – ĉi Kurt en la romano, la viro, kiu rifuzis eskapi, kiam naziismo ekregis, simple ĉar li kredis, ke „mi



devas agi kvazaŭ nun ĉio dependus de mi”. La rakontisto, al kiu ni ŝuldas tiun ĉi verkon, intencis omaĝi al Carl von Ossietzky, unu el la fruaj viktimoj de la terora reĝimo de Hitler, kaj al lia brila kunbatalanto Kurt Tucholsky. Li gratuline brile sukcesis. Foje oni kvazaŭ vidas la intelligentan grimac-rideton, kun kiu Trevor – negermano – skribas: „nederlandaj legantoj eble bezonas iom da klarigo” (paĝo 91) por doni vere senchavan klarigon. Kelkfoje li eĉ eksorĉas ĉe mi – naskita dum la lasta periodo de l' milito – el obskuraj anguloj de la cerbo etajn memoraĵojn pri tiu fora tempo.


Se Trevor ne jam delonge pruvis sian staturon – ne de simple unu inter la Esperanto-verkistoj, da kiuj nuntempe ni havas plurajn manplenojn, sed de aŭtoro je vere monda nivelo, tiam certe nun tion li montris.

Gerrit BERVING

Trevor Steele: *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2009. 344 paĝoj kudre binditaj. ISBN 978-90-77066-41-6.

Prezo ĉe FEL: bindita libro: 19,20 eŭroj + afranko; e-libro: 11,50 eŭroj

La verde farbita birdo



Kiam mi legis – estis tasko en la kadro de universitata kurso pri monda literaturo – la verkon *La farbita birdo* de Jerzy Kosinski, mi estis tre kortuŝita sed plena de duboj. Temas ja pri romano. Neniu infano povus havi tian kruelan danĝeran vivon kaj tamen atingi virecon kaj iĝi intelektulo. Nun mia samgrupano instruis al mi, ke realo povas esti pli kruela, pli nekredebla ol iu ajn songita romano. Post legado de „*La longa vojaĝo*” la farbita birdo eĉ iom paliĝis, almenaŭ perdis sian okulfrapan ruĝan koloron!

La pala najbaro

Mi estas membro de *La Verda Stelo* la antverpena Esperanto-grupo. De tempo al tempo mi tie renkontas simplan ĉiutagan homon, kies vivon mi imagis ĉiutaga. Iam, post prelego en Hago, en la domo de Internacia Esperanto-Instituto, li invitis min al vojaĝo hejmen, en sia aŭto. Denove li aspektis al mi

ĉiutaga homo, iom nigra – mi ne parolas pri lia haŭto, sed pri lia interno ... ĉar li neniam montris rideton – sed tre inteligenta kaj tre afabla. Hazarde mi sciigis, ke li publikigis aŭtobiografion, kaj ĉar ĝi kuŝis antaŭ mi en stando Esperanta dum kulturbazaro, mi iom foliumis la libron kaj iom eklegis ĝin. Kion sepdekjarulo ja povas memori kaj trovi rakontinda pri la dek komencaj jaroj de sia vivo? Almenaŭ mi preskaŭ nenion memoras pri tia foreco! Sed ... ŝajnas, ke tio nepre dependas de la tiamaj travivaĵoj. Eĉ en juneco spertoj povas esti tiel penetraj, ke ili gluiĝas dum la tuta vivo, kaj verŝajne daŭre elradias influon! Samtempe mi konsciiĝis pri la fakto, ke ni scias tiel malmulton pri tiuj, kiuj ofte apudas nin!

Kaŝita historio

Imagu: vi estas kvarjara, milito minacas, la patro soldatiĝas, sed tuj estas resendita hejmen, ĉar oni konstatis ĉe li tuberkulozon ... la patro decidas iri al Svislando por resaniĝi post la morto de la plej juna infano, ĉar li konscias, ke li infektiĝis, senscie, la bebon kaj ne deziras infekti la edzinon kaj la aliajn kvin infanojn (la kvina sin anoncis sed ankoraŭ ne naskiĝis) ... oni konstatas plie ... ke vi, kvarjarulo, havas minacan makuleton sur unu el la pulmoj ... kaj panjo, malgraŭ tio, ke jam estas milito, sukcesas sendi vin per trajno al paĉjo ... sed sola, sub (neplanita) bombardado kaj aliaj minacoj ...

Mi neglektis interpunkcion, ĉar la rakonto tiel supersaltis min, ke mi ne sukcesas kaj ne volas spiri ...

Tiel koŝmara la vojaĝo estis, ke Eddy neniam sukcesis forgesi la eĉ por kvarjarulo hontindan scenon, ke dum la vojaĝo germanaj soldatoj en la trajno kontrolis, ĉu li hazarde ne portas judan pasporteton en sia pantaloneto ...

Bona ideo

Ne, mi ne rakontos la enhavon pli ... vi mem malkovru ĝin! Mi nur malkaŝu, ke estis ankaŭ periodo de plena silento, de muteeco ... kiel en la farbita birdo ... kaj ankaŭ aliloke en la monda literaturo! Interese kaj pripensende! Entute la libro ampleksas malpli ol dek jarojn, sed kiaj jaroj! Ie mi legis reagon de mia amiko Ivo Durwael, kaj li sugestas, ke oni uzu la libron – pro la ĉiutaga lingvo, kiu igas ĝin tre facile digestebla – en daŭrigaj kursoj. Ankaŭ mi pensas, ke tio estus bonega ideo, ĉar ĝi povus esti fonto de treege riĉigaj diskutoj kaj pripensoj. La kelkaj tajperaroj kaj aliaj eraretoj kaj eble kelkaj gramatikaj pridiskutindaĵoj plie bone povas akriĝi la atenton de la legantoj kaj de la instruistoj. Pri Esperanto tute ne estas io ajn en la libreto, sed la lingva problemoj tamen grave rolas. Dum la jaroj en Svislando Eddy perdis sian denaskan lingvon, kaj do ... ne plu komprenas la patrinon. Sed ne nur tion li perdis dum tiuj jaroj. Fakte daŭre temas pri perdado, sed ... denove ... nepre malkovru tion mem.

Ĝi gustas je pli

Ŝajnas, ke en la nuna momento Eddy verkas daŭrigon de sia aŭtobiografio, kaj al iu li diris, ke en la unua parto li tute ne atingis la kulminon de sia suferado. Bona afero estas, ke mi nun jam estas certa, ke li transvivos siajn suferadojn ... ĉar mi scias, ke li daŭre estas inter ni, kaj silente kaj nigre kaj senrideta vagas kaj ofte apudas nin en la kunvenejo de *La Verda Stelo*.

Petro DE SMEDT

Eddy Raats: *La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo*. Eld. Monda Asembleo Socia, Embres-et-Castelmaure, 2009. 106 paĝoj gluitaj. ISBN 978 2 918300 05 2.

Prezo ĉe FEL: 12,80 eŭroj + aŭfranko.

Afriko

Aŭstraj alpistoj sur Kilimanĝaro: konvencio pri klimata protektado postulata

La glacio degelas dramece. Kilimanĝaro, la plej alta monto de Afriko, jam perdis 80 procentojn de sia glacikovro. Kaj kiel la klimata ŝanĝiĝo influas tiun monton, povis vidi anoj de la internacia klimata protekta iniciato *Greenpeaks* kune kun aŭstraj alpistoj.

Montara gvidisto Faustino precize esprimas: „Se ni nun ne priatentos niajn naturon kaj montojn, tiuokaze ĉio estos perdita!” Tiu 65-jarulo jam pli ol 350-foje grimpis la 5895 m altan pinton Uhuru en la orientafrika Tanzanio. „Glacio iĝas videble malpli multa. Tio estas rezulto de la tutmonda varmiĝo en la pasintaj 100 jaroj.” *Greenpeaks* alvokas nun de sur la pinto de Kilimanĝaro ĉiujn alpistojn por kunlaboro kaj subteno de la tutmonda klimata protekta kampanjo *Seal the Deal!* (Sigelu la kontrakton!) de la Natur-

protekta Programo de UN (UNEP). La celo de la programo estas, ke ĉiuj landoj subskribu novan klimata protektan konvencion por bremsi la tutmondan varmiĝon. La voĉo de alpistoj tre gravas ĉe UNEP, ĉar ili estas veraj atestantoj de la efikoj de la klimata ŝanĝiĝo al la sentivaj ekologiaj montsistemoj.

La de la alpistoj sur Kilimanĝaro etenditan standardon *Seal the Deal!* oni uzis unuafoje dum la Tutmonda Klimata Semajno de la 21a ĝis la 25a de septembro 2008 kaj poste transportis al la montosupro.

Greenpeaks estas internacia iniciato pri klimata protekto, kiu atentigas dum plej superaj renkontiĝoj de ŝtataj kaj registaraj estroj pri la klimata ŝanĝiĝo kaj invitas ĉiujn alpistojn, vojaĝantojn kaj naturamikojn partopreni. En Interreto: www.greenpeaks.org.

Evgeni GEORGIEV



Kilimanĝaro, la plej alta monto de Afriko, jam perdis 80 procentojn de sia glacikovro.

Solvo de la litera sudoku (Monato 7/2009)

Multe da legantoj niaj (diverslingve) sentis sin nostalgiaj tamen nur 3 da gajnos libropremion, nome José Mauro Progiante (Brazilo), Jean Cruchon (Francio) kaj Hilmar Jön Bragason (Islando). Gratulojn !

N	O	S	T	A	L	G	I	E
G	L	I	S	E	N	A	O	T
A	E	T	I	G	O	N	S	L
T	N	E	G	I	S	L	A	O
I	G	L	E	O	N	T	N	S
S	A	O	L	N	T	E	G	I
L	I	A	O	T	G	S	E	N
E	S	N	A	L	I	O	T	G
O	T	G	N	S	E	I	L	A

Solvo de “Trastreku” (Monato 9/2009)

Malgraŭ eta eraro nia (la dua litero de la lasta linio horizontale devus esti T kaj ne U) multege da trovis la ĝustan solvon kaj tri da ĝojos libropremion, nome Ernő Könczöl (Hungario), Johan van der Hoek (Nederlando) kaj Oskaro Sher (Sud-Afriko). Gratulojn !

L	O	T	O	A	N	E	I	L
A	F	R	I	K	O	N	E	E
K	O	A	L	O	R	T	E	M
M	E	N	U	M	O	R	A	A
U	R	S	J	H	T	E	R	K
S	U	P	T	A	O	P	A	L
O	S	O	I	I	M	R	U	E
N	S	R	A	L	F	E	D	R
T	T	T	T	S	E	N	S	E

Litera sudoku

La reguloj de ĉi tiu speco de sudoku estas la samaj kiel por la cifera sudoku, nur ke la ciferoj 1 ĝis 9 estas 9 diversaj literoj kaj ke sur la unua horizontala linio griza la litera sinsekvo formas (radik)vorton (aŭ nombron litere skribita).



MARY MUSES

Sendu la vorton antaŭ aprilo al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

Inter la solvintoj Monato elektos tri personojn, kiuj ricevos libropremion!

			T		Ĵ	L		N
	T	N		U		Ĵ		R
R			Ĵ			A		
		U		I				S
I			L		R	T	Ĵ	
		Ĵ		L				A
U			I		A	N		
		T		N			I	

Solvo de “Bone kalkulu” (Monato 5/2009)

Ĉi foje ne malfacilis al mi elekti du gajnantojn por libropremio, male nia enigmo ŝajne jes malfacilis. NUR du (feliĉe ĝustaj) respondoj alvenis de Jones Malcolm el Britio kaj Hans-Werner Grossmann el Svisio. Gratulojn !

*SOLVO: TRI OBLE SEP MINUS
OK PLUS KVIN DIVIDITA PER DU
ESTAS NAŬ*

1	V	I	N	T	R	U	M	P	E	T	O	
2	D	A	N	I	O	M	E	T	E			
3	N	O	B	L	E	K	A	S				
4	T	A	K	S	E	N	E	G	A	L	O	
5	T	R	O	P	I	K	A	S				
6	K	U	L	M	I	N	A	R	E	T	O	
7	V	E	N	U	S	O	N	O				
8	T	A	R	O	K	C	I	D	E	N	T	O
9	K	U	P	L	U	R	A	L	O			
10	O	B	E	L	I	S	K	E	M	O		
11	R	A	V	I	N	J	E	T	O			
12	E	N	D	I	V	I	D	E	N	D	O	
13	E	R	O	D	I	V	E	R	S	A		
14	K	R	E	S	T	A	L	I	O			
15	A	M	P	E	R	A	N	T	O			
16	V	E	N	D	U	E	T	O				
17	K	E	R	M	E	S	C	E	P	T	O	
18	V	E	S	T	A	S	M	A	N	I	O	
19	K	O	L	O	N	O	R	V	E	G	O	
20	M	I	A	Ŭ	R	O	R	O				

Funebro en Japanio

Mia 91-jara patro mortis la 4an de oktobro 2005 post 50-taga restado en hospitalo. Post la morto flegistinoj purigis lian korpon kaj vestis lin per vestaĵoj preparitaj de la patrino. Dume ni telefonis al la funebra kompanio, kiu transportu la patron al la halo de la ceremonio.

La kompanio havas grandan halon, sed ni volis havi familian ceremonion, en kiu partoprenas nur 15 familianoj. Do ni estis kondukitaj al malgranda konstruaĵo, kiu konsistas el malgranda ceremonihalo, ĉambroj por funebrantoj kaj restoracio por kunmanĝo. Mia patro estis metita en angulo de unu ĉambro kaj apude ni kaj la kompaniano kontraktis diversajn aferojn pri la okazigo de la ceremonio, ekzemple speco de ĉerko, kiom da floroj ktp. Laŭ kalkulo la bezonata monsumo estos pli ol 800 000 enoj (5 330 eŭroj), kies duono estis jam rezervita per niaj monataj pagoj al la kompanio.


Tamen ankoraŭ restis granda elspenco: pago al bonzo. Por okazigi funebran ceremonion, ni ĝenerale bezonas bonzon. Ni telefonis al nia konata bonzo kaj demandis, kiom da honorario ni pagu. Lia balbutanta respondo estis „La sumo ne estas fiksita. Sed troviĝas tri niveloj kaj la meza estas 500 000 enoj (3 330 eŭroj) inkluzive de nomado de la postmorta nomo kaj gvido de la ceremonio”. Ni estis surprizitaj pro la alta kosto, sed akceptis lian proponon.

La sekvantan tagon, la 5an de oktobro, „cuja” (laŭvorte tranokta funebra ceremonio) okazis vespere. Kutime ĝi okazas kun legado de sutroj, kaj amikoj kaj konatoj de la forpasinto vizitas ĝin, sed ni decidis okazigi ĝin sen bonzo. Ni ne volis ĝeni aliajn pro mia tro maljuna patro.

La vesperon unue okazis „jukan”, purigo de la kadavro. Antaŭe tiu ago estis farata de familianoj, sed nuntempuloj ne ŝatas kaj ne kutimas tuŝi mortintan homon, eĉ se li/ŝi estas familiano, do ĉion faris la kompanianoj. Ili alportis banujon en la ĉambron kaj banis lin. Post unu horo li estis bele vestita per kompleto. Post kiam ni formale purigis lin sur liaj kunplektitaj fingroj per tuketo, ni metis lin en la ĉerkon, kaj en ĝi ni metis necesajojn por lia ekvojaĝo, nome mandorso-kovrilojn, suro-bendojn, ŝtrumpetojn, pajlajn sandalojn, bastonon kaj glavon. Poste ni kolektiĝis en la restoracio kaj manĝis vespermanĝon, nomatan „okijome” (manĝado kaj trinkado por purigi nin).

La 6an de oktobro je la 9a komenciĝis la ceremonio. Dum 40 minutoj bonzo legis sutron kaj poste ni ĉiuj faris „sjo-okoo” (bruligi incenson) kaj la ceremonio finiĝis. Laŭ la klarigo de la bonzo li legis tri sutrojn, nome por kap-razado (bonzigo), por rapida kurso de budhismo kaj por instruado de la vero. Li preparis mian patron, kiu ĝis antaŭ nelonge vivis en la homa mondo, por ke li bone adaptiĝu al la alia mondo. La sutro estis legata plejparte en la prononcoj de la ĉina lingvo, do ni nenion komprenis. Dume lia morta nomo estis kelkfoje menciita. Ties signifo estis „homo kiu disvastigas la edukadon kaj rigardas ĉion ĝuste”, ĉar li estis profesoro pri biologio en universitato.

Post la ceremonio okazis alia ceremonio „sjo-nanoka” (unuaj sep tagoj). Mortintoj vojaĝas laŭ la jenaj etapoj: dum la unuaj sep tagoj ili piediras al la rivero „Sanzu”, kiu fluas inter la homa mondo kaj la alia mondo. Trapasinte ĝin,



ili eniras en la mondon de Budho, sed la vojo ne estas glata. Dume ĉiun sepan tagon ili devas respondi pri sia vivo koncerne mortigon, ŝteladon, mensogadon, adultadon kaj intrigadon. Ĉe ĉiu etapo ili devas retrorigardi sian vivon kaj penti kaj pardonpeti pro siaj pekoj, kaj fine post 49 tagoj al ili estas permesate eniri en la mondon de Budho.

Origine ĉe la unua sepa tago (post 7 tagoj) kaj ĉe la sepa (post 49 tagoj) oni havis ceremoniojn, sed en nia moderna vivo ni ne povas tiel ofte ferii kaj veni longan vojon por tiuj ceremonioj, do nuntempe en la sama tago tuj post la funebra ceremonio oni havas la ceremonieton de la unua sepa tago, kaj post 49 tagoj oni metas la cindron en la familian tombon.

La ĉerkon oni transportis per luksa, orkolora granda aŭtomobilo al la urba kremaciejo. Tie denove la bonzo legis sutron kaj la oficistoj enŝovis la ĉerkon en la ĉerkobruligujon. Post unuhora atendado en la najbara restoracio ni revenis al la kremaciejo kie atendis nin la cindro de mia patro. Ni duope tenis la ostetojn per bastonetoj kaj metis ilin en la urnon, kaj laste la oficisto metis ostojn el la kranio. Hejmenreveninte kun la bonzo, ni kunmetis hejman altaron, sur kiun ni metis mortnoman tabuleton, foton, incensaron, manĝilaron, florojn ktp. Ni fotiĝis kune, ĉar funebra ceremonio estas rara okazo por ĉiuj parencoj kolektiĝi.

Post 49 tagoj ni denove kolektiĝis por meti la cindron de mia patro en la tombon en la urba tombejo.

HORI Jasuo

Kosmologio de nia jarcento



Dum jaroj mi konas Manuel Halvelik. Ofte mi renkontis lin en nia loka Esperanto-klubo. Mi sciis, ke li estas erudito, pro liaj intervenoj dum debatoj pri iu ajn temo.

Antaŭ nelonge mi hazarde trovis en la reto tekston lian kun la titolo „Sotragogismo” (www.sotragogismo.net). Temas pri pli ol 400-paĝa dokumento pri kosmologio. Baldaŭ evidentiĝis, ke la enhavo transiras miajn digesteblojn. Mi konfrontiĝis i.a. kun fakvortoj el filozofio, natursciencoj, matematiko ..., kiujn mi ne komprenas, kun mencioj de sciencaj leĝoj, kiujn mi ne konas ... Malgraŭ tio mi daŭrigis trafolumadon kaj legadon de partoj. Mi konfrontiĝis kun aro da tute novaj ideoj, ĉiufoje argumentitaj per citaĵoj de aŭtoritataj figuroj aŭ kun mencio de nuntempaj sciencaj malkovroj. Halvelik ne timas montri erarojn aŭ mankojn ĉe plej renomaj sciencistoj. Evidente mi ne povus prijuĝi la enhavon, sed per tiu ĉi artikolo mi esperas instigi sciencistojn konatiĝi kun tiu ĉi riĉenhava verkaĵo.

Jen kion Halvelik mem skribis pri ĝi:

„Temas ja vere pri nova paradigmo, t.e. nova mondbildo kiel siatempe la teorio de Copernicus, kiu ŝanĝis la mondpercepton kaj kune la homsocion. Granda diferenco kun aliaj filozofiaj sistemoj estas ke la mia estas firme apogata de sciencaj donitaĵoj kaj de matematiko.”

Ĝi aperas ĝustatempe en nia homa kulturhistorio, ĉar nur ĵus fizikistaj medioj konstatis kaj certigas, ke la du grandaj teorioj, kiuj regis la pasintan jarcenton, *Kvantumfiziko kaj Relativeco, plu ne validas pro internaj sinkontraŭdiroj*. Kiu mondbildo ilin anstataŭigu, ili neniel scias kaj tion ankaŭ ne hezitas konfesi. La materiismaj amaskomunikiloj ankoraŭ turnas surdan orelon al tiu katastrofa mesaĝo, ĉar ili ja staras aŭ falas per „La Scienco”. Tio facile eblas, ĉar teknologio plu produktas kaj produktos mirigaĵojn, sendepende de teoriaj fundamentoj. Sed ja frue aŭ malfrue la ŝirma veziko de la „publika opinio” krevas. Ne forgesu: „ideoj regas la mondon”. Do ne timu; kvankam mia verko estas malfacile alirebla, ĝi baldaŭ venos al la surfaco. Fakte, jam relative multaj homoj vizitis mian retejon kaj ankaŭ elŝutis materialon, sed (provizore) sen videbla rezulto. Kredeble enparte ankaŭ pro tio, ke eĉ esperantistoj mem neniel atendas renkonti ion historie decidan en nia verda medio.

Halvelik ankaŭ spertis, ke Esperanto ne sufiĉe precizas por la ĉiam pli rapide aperantaj novaj terminoj. Li proponas adaptojn de Esperanto por la terminologio kaj por la ortografio kaj nomis sian projekton *Uniespo* (universala Esperanto). Sed la tekstoj enhavas klarigojn pri ne-Zamenhofaj vortoj kaj pri la adaptita ortografio.

Ivo DURWAELE

ALBANIO

Religiaj eldonaĵoj en librofoiro

Ankaŭ ĉi-jare okaze de tutnacia librofoiro en Tirano pluraj religiaj eldonaĵoj prezentis siajn novajn publikaĵojn. En Albanio, la unusola ateista ŝtato enmondo, dum almenaŭ kvaronjarcento (1967-1990), kiam la religiaj institucioj, ankaŭ ties propagando kaj libera esprimado pri Dio kaj kredo, estis severe malpermesitaj kaj punendaj, nun floras ankaŭ la prireligia literaturo. La librofoiraj montrofenestroj kaj standoj estas okulfrappe plenaj de diversaj religiaj titoloj kaj ĝenroj: katolikaj, ortodoksaj, islamaj, evangeliaj kaj aliaj. Menciinde estas, ke la publikaĵoj kristanaj kuŝas tuj apud la islamaj, kio tute ne ĝenas albanojn, kiuj kunvivas harmonie kun sampatrujanoj de diversaj religikredoj.

En la albanan estas jam majstre tradukitaj ĉiuj ĉefverkoj de kristanismo, islamo ks.; plie oni verkis ankaŭ pri aferoj beletraj, sciencaj, historiaj, moralaj, edukaj, organizaj. En la standoj de franciskanoj, ekzemple, oni trovas plurajn verkojn de eminentuloj el la pasinto, kiuj studis etnografion, historion, arkeologion kaj la lingvon de la albanoj dum jarcentoj, kiam la lando suferis longtempe la jugon de la otomanoj, kiuj eĉ ne permesis albanlingvajn lernejojn kaj publikaĵojn.

La legantoj, scivole, longe staras antaŭ ili por konatiĝi kaj aĉeti librojn aŭ por ĉeesti gazetarajn konferencojn. Hodiaŭ la religio, kiel institucio kaj kredo, estas denove honorinda kaj respektinda, des pli ke ĉe albanoj oni ne konas kverelojn aŭ disiĝojn pro tio.

Bardhyl SELIMI

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!


Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei libroliston laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Aĵnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.


Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Serio Stafeto n-ro 33

Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 714 g,
624 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-39-3;
prezo ĉe FEL 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be